

NOV 24 1919

251

# AMERIKA ESPERANTISTO

OCTOBER, 1919



OFFICIAL ORGAN OF  
**THE ESPERANTO ASSOCIATION**  
OF NORTH AMERICA

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

H. M. SCOTT

MRS. I. M. HORN

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

**BERKELEY, CALIF.**  
Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address: Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

**OAKLAND, CALIF.**  
Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 438 15th St. 19

**SAN FRANCISCO, CALIF.**  
San Francisco Rondo, meets Third Friday eve., 406 Kearny St.  
F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Av.

**MONTREAL, CANADA.**  
Montreal Esperanto Society, Group No. 1. Room 13, Tooke Bldg., St. Catherine St. Meets Wednesday evening at 8.00 o'clock.

**BRIDGEPORT, CONN.**  
Bridgeport Esperanto Society meets every Friday at 7.30 P.M. At 284 Dover St., near Remington Arms. S-ro Gustavus McGroirly Sek., 525 Fairfield Av. Marcus L. DeVine, Pres., 224 Dover St. Visiting Esperantists call Barnum 1294-Ring 13. 19

**WASHINGTON, D. C.**  
La Kabea Esperanto Klubo, dum somero, Apartamento 53, No. 706 G St., N. W., kunvenas Jaŭdon vespere.

Kolumbia Esperanto Unuiĝo. Public meeting third Wednesday of each month except July and August at Public Library. Club meetings each Wednesday evening except third at 20 Randolph Place, N. W. All Esperantists invited.

**CHICAGO ILLS.**  
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y. 1116 W. 19th Place. La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

**BOSTON, MASS.**  
Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

**WORCESTER, MASS.**  
Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

**PORTLAND, ME.**  
Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg. Miss Emma Sanborn, Sec'y, 16 Conant St.

**DETROIT, MICH.**  
Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, B. Lendo, Sek., 120 29th St.

**MANCHESTER, N. H.**  
Pionira Grupo. Sek., Daisy E. Flanders, 714 Beech St. 19

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

**PLAINVIEW, NEBR.**  
Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo por la Junularo. Organizu grupon inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuj! Jare .75; Kvarmonate .25.)  
Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

**HEBRON, NEBRASKA.**  
La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun Jaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 8 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogreie, Vice-Pres.

**HOBOKEN, N. J.**  
"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

**BUFFALO, N. Y.**  
Buffalo Esperanto Society, A. E. Warren, Pres.; Miss Ray Morris, Sec.; meets Thursday evenings at 60 High St. 19

**NEW YORK CITY, N. Y.**  
The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs, Miss Leonora Stoeppler, Sec., 105 W. 94th St.

The New York Barto, or Esperanto supper, is held on the THIRD FRIDAY of every month (6.30 P. M.), Hotel Albert, Cor. 11th St. and University Place, near Broadway surface car; Subway 8th and 14th Sts.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

**CLEVELAND, OHIO.**  
La Zamenhofa Klubo; E. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

**PHILADELPHIA, PA.**  
Phila Esp. Soc. J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Bingham Hotel, 11th and Market Sts.  
Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.  
Esperanta stelo de Polujo. Sekr., S. Zysk. Kunvenasardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

**PITTSBURGH, PA.**  
Esperanto Sec., Academy of Science and Art. James McKirdy, Sec., Box 920. Fridays, 8 P. M.

**MILWAUKEE, WISC.**  
Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

---

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

---

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)  
WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Du Spesmiloj Jare.

Single Copy Ten Cents.

---

VOL. 25

OCTOBER, 1919

No. 1

---

### AMERIKA ESPERANTISTO

One of the dearest aims of the officers of the E.A.N.A. is to give to the Esperantists of all lands and especially those of the United States and Canada the best possible publication. I am sure that the recent numbers have proved that we are attaining desired results.

Under present conditions, the high cost of material and labor, we are greatly in need of enlarging the subscription list. We cannot add to the number of pages, thereby increasing the cost, without our having greater receipts. Every dollar received from subscribers is now used to pay for production. Our Editor has not received any reward for his work, nor have the coeditors. We cannot in reason expect this condition to continue. The Amerika Esperantisto is now a recognized publication. We would like to add many new features and give more space to articles in the Esperanto language. This cannot be done until the subscriptions are multiplied.

I personally appeal to every subscriber to present to the non-subscribing Esperantists of their vicinity the absolute necessity for every one interested in the furtherance of the language to at once become a subscriber.

We owe it to ourselves and to the cause to strive for the completion of our desires. There is worthy and interesting material waiting to be printed, but owing to the limited size of the present publication this matter cannot be used. It can only be done by enlarging the magazine.

If every subscriber will procure even one new subscriber it will be possible to give to the Esperanto world a publication worthy of the cause and a credit to the E. A. of N. A.

Will you not help us to do this?

Edward S. Payson, President E. A. of N. A.

## KIAM SILENTI

J. F. Martin

De longe Fraŭlino Ada kaj ŝia fianco Artur kune studis la astronomion, ĉiuvespere sub la steloj, en ŝia gepatra ĝardeno. Sed en la unua vespero post kiam Ada alligis la esperantan movadon, po kvar spesmiloj, la malproksimaj sferoj fariĝis triviale gravaj en komparo kun la verda steleto. Plenigita per faktoj pri la "nova" lingvo kaj "kara afero," Ada ilin malŝpareme reklamis al sia fianĉo, kaj klopodis envarbi lin.

Tiu junulo estis serioza oficisto, ĉe kompanio kies fabrikoj estis municioj, armeaj provizoj. Krome, li estis plej materiala persono, kiu interesiĝis facile nur pri aferoj kiujn li povas vidi, kaj ne entuziasmiĝis pri io escepte se tio utilis al li. Oni povas konjekti ke ne pro amo al la steloj li konsentis studi al noktan ĉielon apud sia amatino, kies diroj pri Babela turo, la falo de muroj inter la gentoj kaj similaj por li inigmoj, treege enuigis lin.

"Por kio frakasi tiun turon historian?" li petis. "Por kio interesi vian adorindan kapon en la bonfarto de enmurigitaj, kaj eble kanibalaj gentoj?"

"Ĉar mi portas la verdan stelon tiaj interesoj devas rezulti."

"Bonega logiko. Ĉio klariĝas kvazaŭ pruvita per trigonometrio. Komprenoble la portado de kvinpunkta ornamajo infuzas la portanton de koncernoj rilataj al mondpolitiko. Kaj vi diras, inter via litanio de laŭdoj, ke ĉi tiu bela mozaiko de vortoj formetos por ĉiam la militon. Tute ne. Mi volas atentigi vin ke komuna lingvo neniel kontraŭstaris nian militon "Civil" en Usono: kaj en Anglujo, dum la Milito de Rozoj, por trideko da jaroj samlingvanoj avide amortigis unu la alian. Klare do, via hibrida idiomo ne utilis kontraŭ la milito. Fakte, ĝi utilis por nenio. Mi tuj tion konstatas, kaj konsekvence nek plu en tia afero havas intereson, nek aprobas vian intereson."

"Oni jam diris ke vi estos malfacila objekto por esperantigi," serene konfesis Ada. "Tutsame, vi povos ŝanĝiĝi."

Tio ne plaĉis al Artur, kiu estis tre fiera pri sia necedemeco. "Vi ne ŝanĝos min," li asertis.

"Tamen, eble estas ke vi rekonsideros la aferon. Mi konas vin."

"Eble vi konas pli ol mi pri mi mem."

"Eble."

Je tio la junulo tre indignis, kaj por montri ke li ne estas viro kiu kontraŭstaron toleras, li abrupte adiaŭis ŝin kaj majeste marŝis for, kvazaŭ li ne intencas neniam ree viziti ŝin, kvazaŭ ĉio estas finita inter ili.

"Jen, por la afero mi riskas mian tutan feliĉon," martire sopiris Ada. "Komprenoble, mi tre tedis lin. En la propagandado, bone estas scii kiam silenti."

Sed ĉe la vespera krepusko sekvanta, Artur ree aperis antaŭ ŝi, kiel kutime. Fidela kiel la steloj, ĵus ekbrilantaj, la junulo tute ne povis forlasi sian de longe iritan orbiton—tiom ŝi altiris lin. "Ni daŭrigu studi la eterajn astrojn," li sugestis, kun emfazo sur la antaŭlasta vorto.

Ada tute komprenis. De tiam pri la verda stelo ŝi ne faris eĉ la plej malgrandan aludon. La junulo tion rimarkante, supozis ke, en ŝia kaprica cerbo virina, la frenezeco neniam reaperus. Li premis al si la manon, kaj sin konsideris venkanto. Sed kiam virino silentas estas kialo por tio. Certege, ja jes. Ankaŭ, virino ne silentas pli longe ol estas bezone.

Sur ilia edziĝa kontrakto la inko ne estis jam seka, antaŭ ol Ada, fidela esperantistino, kondukis edzon Artur en ŝian skribejon, kaj montris al li super skribtablo vicon de viraj fotografajoj.

“De nun mi ne rajtas kaŝi ilin de vi, Artur kara,” ŝi diris naive. “Tial konatiĝu kun la korespondantoj de via amanta edzino.”

“Ĉu mi ne jam konas iun el ĉi tiuj sinjoroj?”

“Neeble estas; ili ĉiuj estas eksterlanduloj.”

“La diablo! Fraŭloj?”

“Kelkaj estas, aliaj konfesas edzinon.”

“Tre interesa. Kaj pri kiaj temoj vi korespondadas kun ĉi tiu brava bando?”

“Pri ĉio, kaj iam pri preskaŭ—nenio.”

“Kiom konsoliga! Dank’ al Dio, ke mi ne estas ĵaluzema. Nu, ĉu iliaj tre valoraj komunikaĵoj estas io gardata, sekreta? Ĉu mi povas sciiĝi pri kiaspecan legaĵon ĉi tiuj fremdaj hundoj kutimas sendi al vi?”

“Ho, certe. Mi ĉiam estas fiera montri iliajn leterojn. Vidu kiom mi jam kolektis.”

La enmisterigata edzo prenis la prezentatan pakajon. Li ekstra-rigardis. Malfeliĉa homo! La tuto estis esperante skribita.

“Jen ekzempleroj de utilo de lingvo internacia, karulo.”

Artur ne povis kaŝi ke li estis impresata. “Tiaspeca apliko de la ideo iom interesas min,” li konfesis. Kaj post momenta meditado, iom raŭke, “Mi pensas ke mi ankaŭ eklernos tiun lingvan aglomeraton.”

“Bone, vi do kapitulacas.” Gaja estis la nova edzino. “Vi jam nun komprenas ke ĝi faligos la murojn, forigos militojn. Vi ŝanĝiĝas tute kiel mi antaŭdiris.”

“Ha, ne, tute alie. Kiel mi konvertiĝus al via opinio? La mondo ĉiam suferos pro militoj. Sed kompreneble malamikaj popoloj pli konvene kaj efike povos interbatali, se al ili estas lingvo komuna. Kvankam tia lingvo en nenia grado malhelpos al milito, kiel mi klarigis al vi komence, ĝi povas igi multe malpli malagrablaj la baraktojn internaciajn. Jen kial mi fine aprobas la ideon. Ĉu vi povas supozati ke estas alia motivo instiganta min ekstudi Esperanton?”

Kareseme, lia feliĉa edzineto lin rigardis, muta kiel sfinkso. Bone estas scii kiam silenti.

Cajreno.

---

Dum la lasta monato, kion scias sendube jam niaj legantoj, okazis en Bostono strangaj kondiĉoj. La estro de la Esperanta Oficejo foriris por subpremi la minacantan bolŝevisman, kaj dume la Oficeja sovieto prokrastigis la aperon de nia gazeto. Ni ne intencas pli longe tion permesi, sed kion intencas la sovieto,— kiu scias!

## GEMS OF ESPERANTO LITERATURE

## La Ideoj de unu Franco pri Milton

Kiam mi volas doni al mi scenon de entuziasmo kaj ĝui la tutan forton de mia fantazio, mi kuraĝe ekkaptas la faldojn de flirtanta robo de la altega blindulo de Albiono en la momento, kiam li eksaltas al la ĉielo kaj proksimiĝas al la Eternulo. — Kia muzo povis subteni lin en tia alteco, kien neniu homo antaŭ li kuraĝis turni siajn rigardojn? — De la blindiga vestiblo ĉiela, kiun la avara Mamono rigardis per enviaj okuloj, mi kun terura sento pasas al la vastaj kavernoj de la loĝejo Satana; — mi ĉeestas ĉe la infera konsiliĝo, mi enmiksiĝas kun la amaso de la ribelaj spiritoj, kaj mi aŭskultas iliajn paroladojn.

Sed tie ĉi mi devas konfesi malvirteton, pri kiu mi ofte riproĉis min.

Mi ne povas ne interesi je tiu kompatinda Satano, (mi parolas pri la Satano de Milton), post kiam li estas eljetita el la ĉielo. Kvankam mi malaprobas la obstinecon de la ribelulo, mi konfesas, ke la forteco, kiun li vidigas en la troega malfeliĉo, kaj lia granda kuraĝo, devigas min kontraŭvole admiri lin. — Kvankam mi scias la malfeliĉojn devenintajn de lia pereiga entrepreno, kiam li perforte malfermis la pordegon de la infero, por veni malkvietigi la edzan vivadon de niaj unuaj gepatroj, mi malgraŭ ĉio, ne povas deziri, eĉ momenton, ke li dum la vojiro pereu en la konfuzo de la haoso. Mi eĉ kredas, ke mi volonte helpus al li, se ne detenus min la honto. Mi sekvas ĉiujn liajn movojn, kaj mi sentas tiom da plezuro, vojaĝante kun li, kvazaŭ mi estus en deca societo. Vane mi diras al mi, ke li estas ja diablo, ke li estas pereiganto de la homaro, ke li estas vera demokrato, ne kiel tiuj de Atenoj, sed kiel tiuj de Parizo, ĉio tio ĉi ne korektas min de mia antaŭjuĝo.

Kia grandega projekto! kaj kia maltimo en la plenumo de ĝi!

Kiam la vastaj kaj trioblaj pordoj de la infero subite malfermiĝis laŭ la tuta larĝeco antaŭ li, kaj kiam la profunda foso de la nenio kaj nokto aperis en sia tuta teruro antaŭ liaj piedoj — li per maltima okulo rigardis la malluman imperion haosan; kaj, sen ŝanceliĝo, malvolvante siajn larĝajn flugilojn, kiuj povus kovri tutan armeon, li ekjetis sin en la senfundajon.

Tion ne farus la plej sentima kuraĝulo. — Kaj tiu estas, laŭ mia opinio, unu el la plej fortaj elpensadoj, kiel ankaŭ unu el la plej belaj vojaĝoj iam faritaj, — krom la vojaĝo interne de mia ĉambro.

El "Vojaĝo interne de mia Ĉambro," de Xavier de Maistre.

This month's selection is from the French, translated into Esperanto by a Frenchman.

These selections are designed to give some small idea of the scope and richness of Esperanto literature. The English translation, while idiomatic, has the single aim of representing as faithfully as possible the Esperanto text. Of course, like every living language, the international has also its untranslatable elements, and only the adept can appreciate their beauty and possibilities in the hands of masters. The appended notes are not meant for beginners, and are critical and literary rather than pedagogical in their nature.

## FOR THE STUDENT

## A Frenchman's Ideas on Milton.

When I wish to treat myself to a scene of enthusiasm and enjoy to the full capacity of my fancy, I bravely seize the folds of the fluttering robe of Albion's sublime blind man at the moment when he takes a leap to heaven and draws near to the Eternal.—What muse could sustain him at such a height, whither no mortal before him had dared to turn his gaze?—From the blinding vestibule of heaven, upon which greedy Mammon had looked with envious eyes, I pass with a sense of terror to the vast caverns of the Satanic abode;—I am present at the infernal council, I mingle with the host of the rebel spirits, and I listen to their speeches.

But here I must confess a delinquency with which I have often reproached myself.

I cannot help getting interested in this poor Satan (of course I mean Milton's Satan), after he has been ejected from heaven. Altho I disapprove the rebel's obstinacy, I confess that the fortitude he evinces in his prodigiously excessive misfortune, and his high courage, compel me in spite of myself to admire him.—Tho I am aware of the misfortunes that have sprung from his fatal enterprise, when he forced the gate of hell to come and disquiet the married life of our first parents, I nevertheless for all that cannot bring myself to wish, even for a moment, that he should perish en route amid the confusion of chaos. I even believe I would be glad to assist him, were I not deterred by shame. I follow his every move, and I feel as much pleasure travelling with him as if I were in decent company. It is in vain that I tell myself that he is plain devil, that he is the curse of humanity, that he is your true democrat, not like those of Athens, but like those of Paris,—all this fails to correct my predilection.

What an immense project! and what boldness in its fulfilment!

When the vast and triple doors of hell suddenly opened to their full extent before him, and when the deep pit of nothingness and night yawned in their full terror at his feet—he looked with bold eye upon the dark empire of chaos; and without hesitation, spreading his broad wings, which could cover a whole army, he launched out upon the void.

That not the most intrepid hero would do. And that is, in my opinion, one of the largest schemes, as well as one of finest journeys ever made,—aside from the journey within my room.

From "A Journey within my Room." The author lived 1763—1825.

## Notes.

**Forton**: farther on we find **forteco**: there is a distinction in classical usage, **forto** (usually **fortoj**) referring to "force" measured by results, while **forteco** denotes the abstract quality. —**ekkaptas... ek-saltas... ekjetas**: note the force of **ek-**, connoting "sudden beginning." —**la faldojn de ... robo de la**: in all good writers superfluous articles are commonly omitted. Similarly, in F. K. 270 we have **la historion de naskiĝo de la kristianeco**, central article omitted as here. —**rigardojn**, more than one "look," hence rendered "gaze." —**blindiga vestiblo**

**ĉiela**: farther on **malluman imperion haosan**: here the paired adjectives seem to have different positions because they have different functions, the first being "attributive" (ascribing a quality), while the second is "locative" (telling the place where): where an adjective follows its noun, it is often, as here, the equivalent of the genitival construction ("of heaven," "of chaos,") and cp. **loĝejo Satana** below. —**avara Mamono**. —**konsiliĝo** and **konsilantaro** both mean "council": what is the difference, if any?

**Troega**, a very strong word, for which we can hardly find an equivalent (**troa**, excessive; **troega** would be something like "intensely excessive").—**admiri lin**: above, **subteni lin**, **devigas min**; below **detenus min**, **korektas min**, **ekjetis sin**: note position of the pronoun: the translator in breaking away from the usages of his mother tongue (in Fr. pronoun-objects usually precede verbs) places his pronouns in reverse order from the common usage of most good writers (which in fact often agrees with the Fr. order.—**kontraŭvole**: connoting "resistance," which **senvole** would not.—**perforte** (Kabe also used **superforte**) always indicates "violence."—**por veni malkvietigi**: strict logic would require a purpose **por** also before **malkvietigi**, but it is commonly omitted after **veni** and **iri**.—**vivadon**: **-ad-** is inserted to denote the entire course of life (Satan's influence was a continuous performance).—**vojiro**: this word, as evinced in numerous classic instances, implies a "somewhat slow and labored progress," and is not synonymous with **vojaĝo**.—**ja**: a particle of emphasis whose delicate force is hard to render in Eng. (cp. the Greek particles **de** and **ge**).—**pereiganto**: lit. "ruin-maker."—**li estas vera demokrato . . . kiel tiuj de Parizo**: here is a touch which finds its explanation in the life of the author and the times in which he wrote. Xavier de Maistre belonged to the French nobility, but wrote during the throes of the Revolution. He is one of the few writers of the period who represent the aristocratic viewpoint, against which the **demokratoj de Parizo** were making bloody protest.—**Atenoj**: plural because the original form is plural (Gk. Athenaj); cp. **Sirakuzoj** (Lat. Syracusae), F. K. 345.—**antaŭjuĝo** means previously formed judgment, whether good or bad.

**Maltimo**: dist. **kuraĝo** above.

**Foso**: like all masters of Esperanto Sam. Meyer dispenses with superfluous affixes: an inferior writer would have had **fosaĵo**.—**aperis**: Kabe in a similar connection uses the bolder **oscedis** ("yawned"), V. en P. 13.

**Tion**: note the emphasis of its position.—**elpensaĵo**: lit. "something thought out," usually means "an invention."—**krom**: Meyer follows Z's use of this prep. (Kabe generally uses the clearer **ekster**).—**la vojaĝo interne de mia ĉambro**: the author here harks back to the whimsical theme of his book.

---

**Patro** — Kutime, mia filo, la vojo al sukceso estas longa kaj tre mal-facila.

**Filo** — Ĉu ne ekzistas mallongaj vojetoj?

**Patro** — Ho jes; la malliberejoj estas plenaj de homoj, kiuj uzis la vojetojn mallongajn.

(Ho Ho trad.)



In response to a number of requests we print here the list of commonly used words officialized by the vote of the Lingva Komitato, and appearing in the Oficiala Gazeto for Jan. and July, 1914. These are sometimes called the 2nd and 3rd aldonoj, but are officially all "2nd." The suffix —ISM was also officialized. English from Millidge, etc.

<b>abnegacio</b> , self-denial	<b>banano</b> , banana
<b>abrupta</b> , abrupt	<b>bandago</b> , bandage
<b>adicii</b> , add up	<b>bandito</b> , bandit
<b>agiti</b> , agitate	<b>barako</b> , shanty
<b>akapari</b> , corner (stock, etc.)	<b>barikado</b> , barricade
<b>akcidento</b> , casualty	<b>baseno</b> , bed (of sea, harbor, etc.)
<b>akrobato</b> , acrobat	<b>batisto</b> , cambric
<b>akuta</b> , acute	<b>bazalto</b> , basalt
<b>akvilegio</b> , columbine	<b>baziliko</b> , basilica (arch.)
<b>aldo</b> , alto (voice)	<b>berilo</b> , beryl
<b>algo</b> , alga (sea-moss)	<b>bibliografio</b> , bibliography
<b>alhemio</b> , alchemy	<b>bilardo</b> , billiards
<b>alibio</b> , alibi	<b>biografio</b> , biography
<b>alineo</b> , indentation	<b>bisturio</b> , surgical knife
<b>alternativo</b> , alternative	<b>bojkoto</b> , boycott
<b>ametisto</b> , amethyst	<b>bombo</b> , bomb
<b>amfiteatro</b> , amphitheatre	<b>bosko</b> , grove
<b>amortizi</b> , amortize (by sinking fund)	<b>braceleto</b> , bracelet
<b>amuleto</b> , amulet	<b>bramano</b> , Brahmin
<b>anagalo</b> , pimpernel	<b>breĉo</b> , breach
<b>anagramo</b> , anagram	<b>brigado</b> , brigade
<b>anakronismo</b> , anachronism	<b>brokanti</b> , deal in 2nd hand goods
<b>anapesto</b> , anapaest (poet.)	<b>brunkito</b> , bronchitis
<b>aneksi</b> , annex	<b>bronko</b> , bronchial tube
<b>anemono</b> , anemone	<b>burleska</b> , burlesque
<b>angeliko</b> , angelica	<b>burnuso</b> , burnous (Arab mantle)
<b>anomalio</b> , anomaly	<b>celerio</b> , celery
<b>antitezo</b> , antithesis	<b>celulozo</b> , cellulose
<b>antologio</b> , anthology	<b>centigramo</b> , centigram
<b>aorto</b> , aorta	<b>centilitro</b> , centilitre
<b>apio</b> , wild celery	<b>cidonio</b> , quince
<b>apostrofo</b> , apostrophe (gram.)	<b>cikado</b> , cicada
<b>apoteozo</b> , apotheosis	<b>ciklo</b> , cycle
<b>apozicio</b> , apposition	<b>ciklono</b> , cyclone
<b>arabesko</b> , arabesque (arch.)	<b>ciklopo</b> , Cyclops
<b>arbalesto</b> , crossbow	<b>cinika</b> , cynical
<b>arniko</b> , arnica	<b>cirkumflekso</b> , circumflex
<b>arterio</b> , artery	<b>ĉaro</b> , chariot
<b>asimili</b> , assimilate (trans.)	<b>dalio</b> , dahlia
<b>asonanco</b> , assonance	<b>debato</b> , debate
<b>aspergi</b> , sprinkle (with Holy Water)	<b>decigramo</b> , decigram
<b>atavismo</b> , atavism	<b>decilitro</b> , decilitre
<b>ateismo</b> , atheism	<b>decimalo</b> , decimal
<b>atlaso</b> , satin	<b>decimetro</b> , decimeter
<b>aŭditorio</b> , auditorium	<b>dekagramo</b> , dekagram
<b>aŭtobiografio</b> , autobiography	<b>dekalitro</b> , dekalitre
<b>aŭtografio</b> , autograph	<b>dekametro</b> , dekameter
<b>aŭtokrato</b> , autocrat	<b>demagogo</b> , demagogue
<b>azilo</b> , asylum	<b>demokrato</b> , democrat
<b>bacilo</b> , bacillus	<b>demonstrativa</b> , demonstrative (grm.)
<b>bakterio</b> , bacterium	<b>departemento</b> , department (gov.)
<b>balado</b> , ballad	<b>determini</b> , decide
<b>balistiko</b> , ballistics	<b>diabeto</b> , diabetes
<b>balono</b> , balloon	<b>diafano</b> , pellucid
<b>baloti</b> , vote by ballot	<b>dialektiko</b> , dialectics
<b>balzamo</b> , balsam (tree)	<b>diapazono</b> , diapason
<b>balzamino</b> , balsam (plant)	<b>dianto</b> , pink
<b>banala</b> , trite	

- didaktiko**, didactics  
**diktatoro**, dictator  
**dilemo**, dilemma  
**dinamiko**, dynamics  
**divano**, divan (seat or council)  
**drakmo**, drachma  
**dualismo**, dualism  
**duŝo**, shower-bath  
**dinamito**, dynamite  
**dinamometro**, dynamometer  
**disciplino**, discipline  
**ditirambo**, dithyramb  
**eburo**, ivory  
**ekipi**, equip  
**eklogo**, eclogue  
**ekceso**, excess (riot)  
**eksklusive**, exclusively  
**ekskomuniki**, excommunicate  
**ekspuati**, exploit  
**ekvacio**, equation  
**ekvilibro**, balance  
**elfo**, elf  
**enciklopedio**, encyclopedia  
**endivioi**, endive (plant)  
**entomologio**, entomology  
**Epifanio**, Epiphany  
**eriko**, heath  
**erizipelo**, erisypelas  
**eskorto**, escort  
**etimologio**, etymology  
**etnografio**, ethnography  
**Eŭkaristo**, Eucharist  
**eŭnuko**, eunuch  
**evolui**, evolve  
**fakiro**, fakir  
**faktoro**, agent, factor (math.)  
**falango**, pŝalanx(mil.); phalange  
**familiara**, familiar  
**fanatika**, fanatic  
**fanfaro**, fanfare  
**feminismo**, feminism  
**feministo**, feminist  
**fenikso**, phoenix  
**feŭdo**, fief  
**fiakro**, cab  
**fjordo**, fjord  
**floreno**, florin  
**fonografo**, phonograph  
**formala**, formal  
**forumo**, forum  
**fresko**, fresco  
**friso**, frieze (arch.)  
**fuko**, seaweed  
**galantino**, jellied meat  
**galanto**, snowdrop (plant)  
**garnituro**, decorations  
**garolo**, jay  
**gemo**, gem (min.)  
**genealogio**, genealogy  
**geodezio**, geodetics  
**gimnazio**, lower preparatory school  
**gladiatoro**, gladiator  
**glazuro**, glaze  
**gnomo**, gnome  
**gorilo**, gorilla  
**gotika**, Gothic  
**grafito**, graphite  
**gripo**, grippe  
**grog**, grog  
**groteska**, grotesque  
**grumbli**, grumble  
**gubernio**, governmental district  
**gutaperko**, guttapercha  
**ĝendarmo**, gendarm  
**ĝino**, gin (drink)  
**halebardo**, halberd  
**haremo**, harem  
**harmoniko**, harmonica  
**harmonium**, harmonium  
**harpio**, harpy  
**hazardo**, hazard  
**heksametro**, hexameter  
**hektogramo**, hektogram  
**hektolitro**, hektolitre  
**hektometro**, hektometer  
**heliko**, snail  
**heliotropo**, heliotrope  
**hermafrodito**, hermaphrodite  
**hetmano**, hetman  
**hidro**, hydra  
**hidrostatiko**, hydrostatics  
**hidroterapi**, hydrotherapy  
**hieroglifo**, hieroglyphic  
**higrometro**, hygrometer  
**hipertrofio**, hypertrophy  
**hipodromo**, hippodrome  
**hisopo**, hysop  
**horoskopo**, horoscope  
